★

# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

## Sur flugiloj de fantazio – Karl Friedrich May kaj František Flos

Ili ambaŭ estis famaj aŭtoroj, kiuj verkis rakontojn kaj romanojn pri aventuroj, kiujn iliaj herooj travivis en malproksimaj landoj. Antaŭ verkado ili diligente studis informojn pri diversaj landoj, en kiujn ili neniam vojaĝis, sed danke al eksterordinara talento kaj senlima fantazio kapablis krei eĉ iluziojn de propraj travivaĵoj. Ili ne imitis romanojn de Jules Verne, sed enviciĝis en tutmondan aventuran literaturon.

František Flos (1864 – 1961) estis ĉeĥa instruisto kaj lerneja inspektoro, patrioto, tre laborema aŭtoro de teatraĵoj, rakontoj kaj romanoj por infanoj kaj junularo. Li kapablis priskribi vivon de bohemiaj kamparanoj same interese kiel aventurojn de vojaĝantoj en ekzotaj landoj. Li ne verkis satire, sed al liaj verkaĵoj neniam mankas karesa humuro. Liaj aventuraj rakontoj ĉiam donas al legantoj moralajn instruojn.

Karl Friedrich May (1848 – 1912) estis saksona instruisto, redaktoro de kelkaj gazetoj kaj sukcesa verkisto. Lia eniro en literaturon ne estis facila, ĉar li devenis el malriĉa familio, en sia infanaĝo estis blinda, poste psiĥike malsana kaj pro sia konduto kelkfoje malliberigita. Liaj rakontoj pri aventuroj en Usono, Proksima Oriento, Ĉinio kaj aliaj landoj fariĝis favorata legaĵo de milionoj da homoj en tuta mondo. Oni ilin multfoje eldonis, tradukis kaj filmis. Persona vivo de May ne estis feliĉa, sed liaj verkaĵoj estas plena de humanismo, sopiro pri justeco, libereco kaj paco.

**Lingvo:** Esperanto

**Prelegos:** Oldřich Arnošt Fischer

**Kiam:** la 15an de oktobro 2025 je la 18.00-a h (la klubejo estos malfermita ekde 17.45)

**Kie:** Občanský klub, **Hybešova 65a**, Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybeŝova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la mapon. La plej proksima tramhaltejo estas Václavká (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)

Ĉeesta renkontiĝo, ĝi ne estos registrata.

★

# Ni rekomendas

- La 17an — 19an de oktobro 2025 Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Havířov-Těrlicko
- 1-a — 8-a de aŭgusto 2026 111-a Universala Kongreso de Esperanto, Graz, Aŭstrio

★

# Cetera programo en oktobro

La 22an **Instruado de Esperanto al nevidantoj** – Aranka Laslo kaj Nedeljka Ložajioć (RS), rete per Zoom, je la 19a h.
La 29an **Literaturo en Esperanto** – Miroslav Malovec, la klubejo

# Programo en novembro

.
La 5an **Mondaj heredaĵoj en Ĉeĥio** – Petr Chrdle, rete per Jitsi, je 18.30
La 12an **Konfuziloj** – Milan Kolka, la klubejo
La 19an *Ankoraŭ ne agordita, komuna renkontiĝo kun klubo el Glivice*, rete per Zoom, je la 19a h.
La 26an **Sicilio kaj Italio** – Jana Zigal, la klubejo
Antaŭkristnaska renkontiĝo okazos la 10an de decembro.
Programo ĝis la jarfino estas jam agordita krom komunaj retaj renkontiĝoj kun poloj. Tamen mi petas vin, ke vi jam pripensu vian kontribuon al programo komence de venonta jaro.

★

Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (https://www.esperantobrno.cz/index.php/eo/aprogramo),
- na naší stránce na Facebooku (https://www.facebook.com/esperantobrno/)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem kanálu na Youtube (https://www.youtube.com/@esperantobrno).

Milan Kolka
prezidanto

(Noto: bonvolu ne uzi retpoŝtadreson invitiloj@esperantobrno.cz por respondoj, ĉar ĝi funkcias kiel nigra truo. Se vi sendus ion ajn al ĝi, la mesaĝo atingus nenies retpoŝtkeston.)